

Johann Wolfgang von Goethe,  
Glückliche Fahrt

Die Nebel zerreißen,  
Der Himmel ist helle,  
Und Äolus löset  
Das ängstliche Band.  
Es säuseln die Winde,  
Es rührt sich der Schiffer.  
Geschwinde! Geschwinde!  
Es teilt sich die Welle,  
Es naht sich die Ferne;  
Schon seh ich das Land!

...

Johann Wolfgang von Goethe,  
Feliça veturo

*tradukita de Wilhelm Barnickel*

Nebul' disŝiriĝas,  
Ĉielo heliĝas.  
La timan ligilon  
Malnodas Eol'.  
Susuras la ventoj,  
Ekagas ŝipistoj.  
Rapidu! Rapidu!  
La ondoj partiĝas,  
La for' proksimiĝas.  
Vidiĝas la land'.<sup>3</sup>

...

Johann Wolfgang von Goethe,  
Feliça navigado

*tradukita de Richard Schulz*

Nebuloj ŝiriĝas.  
Serenas ĉielo.  
Timeman rubandon  
Malnodas Eol'.<sup>4</sup>  
La ventoj klopodas.  
Vigliĝas ŝipestro.  
Rapide! Rapide!  
La ondo disiĝas.  
La for' proksimiĝas.  
Aperas la land'.

...

---

<sup>3</sup>Sinjoro Barnickel origine skribis:

Jam vidas mi land'.

(Sed tie mankas la akuzativa formo "landon".)

<sup>4</sup>Rikardo Ŝulco skribis origine:

Eolo malnodas

Timeman ruband'.

(Sed tio estas gramatike malĝusta. Devus teksti "Timeman rubandon". M. Retzlaff)

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22).*

*Arg-268-540 (2004-09-09 09:10:37)*

*Traduko de la Germana poemo “Glückliche Fahrt” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de WILHELM BARNICKEL (\*1921-09-02) en 1983.*

*Arg-268-544 (2013-07-20 12:20:36)*

*Tiun ĉi poem-tradukon sendis al mi, Manfred Retzlaff, en 1984 mia fervojista kolego Willi Barnickel (Tiroler Str. 12b, D-60596 Frankfurt am Main, Germanujo). La lastan linion de la poem-traduko mi, Manfred Retzlaff, provis en 2004-09-09 pligustigi; ĉar s-ro Barnickel erare neglektis, ke post la vorto “vidas” oni devus uzi la akuzativan formon “landon”. Kaj la akuzativa finaĵo “-on” ne estas elizebla (ellasebla).*

*Traduko de la Germana poemo “Glückliche Fahrt” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, \*1906-07-12 – †1997-09-26) en 1984.*

*Arg-268-542 (2013-02-26 15:11:56)*

*Tiu ĉi poem-traduko aperis presita en 1984 en la “Vestfaliaj Flugfolioj”, kiun eldonis la konata Esperanto-poeto Rikardo Ŝulco (Richard Schulz), kiam li loĝis en la germana urbo Mindeno (Minden). La trian kaj kvaran liniojn de la poemtraduko mi, Manfred Retzlaff, provis en 2004-09-09 plibonigi; ĉar Rikardo Ŝulco erare neglektis, ke post la vorto “malnodas” oni devus uzi la akuzativan formon “rubandon”. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz).*